

Progresemuloj...

SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) estas la plej grava tutmonda organizaĵo de laboristaj esperantistoj. Ĝi estas asocio, kiu celas faciligi la translingvajn kaj transnaciajn rilatojn inter tiuj homoj, kiuj luktas por mondo sen klasa aŭ alitipa ekspluatado.



...en la tuta mondo...

SAT grupigas homojn ĝenerale kun maldekstraj opinioj, el ĉiuj ideologiaj tendencoj, kiuj trovas en komuna agado sian unuecon. Krome, SAT estas, laŭ sia nomo, sennacieca, kio signifas, ke tute ne gravas la nacio nek ŝtato al kiu ĝiaj anoj apartenas, kaj la asocio ne havas naciajn filiojn. Ĝi tamen kunlaboras je nacia nivelo kun la Laboristaj Esperanto-Asocioj (LEAoj), kiuj informas pri Esperanto kaj zorgas pri ĝia instruado sur diversaj lingvoteritorioj.



...interkompreniĝas en SAT

Konkrete, SAT plenumas siajn celojn per :

- **faciligo** de rektaj ideinterŝanĝoj inter membroj pere de adresaro (papera kaj reta), dissendolistoj kaj kongresaj debatoj (dum aŭ ekster la oficiala programo);



- **disponigo** de abunda kleriga materialo en la retejo **SAT-Kulturo**;

<http://www.satesperanto.org/-SAT-Kulturo-.html>


- **eldono** de la dumonata **Sennaciulo**, kun dosieroj pri aktualaj socipolitikaj problemoj, pritraktitaj de kunlaborantoj el diversaj mondopartoj, kaj informoj pri la agado de laboristaj esperantistoj tra la mondo;

<http://www.satesperanto.org/-Sennaciulo-.html>



- **eldono** de la jara **Sennacieca Revuo**, kun ampleksaj eseoj, plejofte originale verkitaj de esperantistoj aparte kompetentaj en la pritraktita fako, kaj beletraĵoj;

<http://www.satesperanto.org/-Sennacieca-Revuo-.html>



- **eldono** de libroj, broŝuroj, filmoj i.a. kadre de la **Eldona Fako Kooperativa**.

<http://www.satesperanto.org/eldonkooperativo/>



<http://www.esperantofilmo.com/>



Unuvorte, SAT celas per konstanta uzado de Esperanto kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

(el la statuto de SAT)



Ili estas SAT-anoj...

Lala – instruistino en Antananarivo



Paz – laboristo en sendependa eldonejo en Seulo

Tereza – emerita sed daŭre instruanta Esperanton en Beogrado... kaj en aliaj mondopartoj



Bernardo – abelbredisto en Melburno

...ĉu vi?

- Mi deziras ricevi pliajn informojn pri SAT.
- Mi deziras ricevi senpagan ekzempleron de Sennaciulo.
- Mi deziras ricevi liston de SAT-eldonaĵoj.
- Mi aliĝas al SAT kaj kunsendas unuan kotizon.

Resendu al:

SAT,
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris
Francio-France;

aŭ rete : satesperanto@free.fr

<http://www.satesperanto.org/Membrigxi.html>

Por ke alia mondo eblu:



tutmonda solidareco!

Sennacieca Asocio Tutmonda

Kultura kaj kleriga asocio por laboristaj esperantistoj

www.satesperanto.org

